


# Programo de KKPS

<b>Vendredo</b>	<b>Granda salono</b>	<b>TEJO-ĉambro</b>	<b>Ekstere</b>
Ĝis 18:00	Akceptejo		
18:00-19:30	Vespermanĝo		
20:00-22:00	Balfolkaj dancoj de Catalina		
22:00-iam	Trinkejo		
<b>Sabato</b>	<b>Granda salono</b>	<b>TEJO-ĉambro</b>	<b>Ekstere</b>
8:30-9:00	Matenmanĝo		
9:00-9:30	Membroasembleo NEJ	Enkonduko	
9:30-10:00		Klarigoj +diskuto	
10:00-10:30	Estrarkunsido NEJ	Trejnado alirebleco	Promeno al Zamenhof-festo
10:30-11:00			Prelego Federico Gobbo
11:00-11:30			Tagmanĝa bufedo
11:30-12:00			
12:00-13:00			
13:00-14:00			Prelegoj
14:00-14:30			Paŭzo
14:00-16:30			<b>Kajto</b>
18:00-19:30	Vespermanĝo		
20:00-22:00	<b>Halovena balo</b>		
14:00-16:30	Diskejo & trinkejo		
<b>Dimanĉo</b>	<b>Granda salono</b>	<b>TEJO-ĉambro</b>	<b>Ekstere</b>
8:30-9:00	Matenmanĝo	Trejnado	
9:00-9:30			
9:30-10:00	Verdaj Skoltoj	Demandaro	
10:00-10:30			
10:30-12:30		Planado	<b>Ekskurso</b>
12:30-14:00	Tagmanĝo		
14:00-16:00	Purigado		14:00-16:00



# Pos-Amiko

Aŭtuno 2017, Numero 22

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## INDEKSO:

1. Fina venko per TEJO-volontuloj?
2. En la mondon venis nova dieto
2. Amikumu lanĉos plenkreskan version
2. Civito celas rekonon de Islama Ŝtato
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

## KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

## Fina venko per TEJO-volontuloj?

Malnova kaj vaste konata estas la fenomeno de la TEJO-volontulo. Se la estraro estas la vizaĝo de TEJO, la volontulo estas la mano, kiu faras la laboron kaj ricevas la poŝton. Rekonante la valoron de la posteno, antaŭ kelkaj jaroj la tiama TEJO-estraro faris strategian decidon dungi aldonan volontulon, uzante por tio la subvencian programon EVS.

Se eblas dungi du volontulojn, kial ne tri, aŭ kvar? La kvanto de TEJO-volontuloj pli kaj pli kreskis, kaj paralele al ili ankaŭ aperis UEA-volontuloj. Ĉar la Eŭropa Unio pagas, eĉ ne tiom gravas, ĉu la volontulo tuj povas kontribui al la estrara taskaro, aŭ eĉ parolas Esperanton. Anstataŭe la posteno nun rolas kiel varbilo kaj kurso por komencantoj.

La Pos-Amiko sukcesis akiri strategian planon de TEJO por 2018, en kiu skribiĝas, ke la ĉefa varbmetodo pri Esperanto en la estonteco estos volontulado. Se oni povas oferti al junuloj tutjaraĵjn loĝadon kaj poŝmonon, lernado de la Lingvo Internacia iĝas pli alloga. TEJO kaj UEA tial celas altigi la kvanton de volontuloj grade ĝis kvincentmil jare en 2022. Post tio ne plu estos domoj en Roterdamo, do alia organizo devus transpreni la respondecon.

## Amikumu baldaŭ lanĉos plenkreskan version

La vaste konata aplikaĵo Amikumu estas la plej facila maniero por trovi en sia ĉirkaŭaĵo homojn, kun kiu eblas paroli Esperanton. Eventuale la aplikaĵo ankaŭ utilas por trovi homojn, kun kiu oni parolu en alia specifa lingvo. Sed la homa agado estas pli diversa ol nur parolado. Sennoma fonto en la teamo de Amikumu rakontas pri novprogramota versio:

Poso: “Kio mankas en la nuna versio de Amikumu?”

E.: “La nuna versio tre taŭgas por ekparoli kun homoj. Sed mankas filtriloj, se mi volas kun tiu persono fari ion alian poste. Ekzemple bicikli, velboatumi, aŭ kune rigardi romantikajn sunsubirojn.”

P.: “Kion vi planas aldoni en la sekva versio?”

E.: “Ni aldonos informkampojn pri alteco, harkoloro, preferoj, tiel plu. Kaj ni ankaŭ aldonos pli da ebloj ol la nun ekzistantaj du seksoj.”

P.: “Kiom longe via uzantaro devos atendi tiun ĝisdatigon?”

E.: “Fakte temas ne pri ĝisdatigo sed pri nova aplikaĵo, kiun ni planas nomi Amorumu. Do se oni ŝatos tiun aplikaĵon, elŝutu ĝin, diskonigu ĝin, kaj abonu mian kanalon. Kaj se vi ne elŝutas ĝin, mi trovos vin kaj ŝtelos vian telefonon. Mŭahaha!”

## Esperanta Civito celas rekonon de Islama Ŝtato

Post la malsukceso de la provo fuzii kun SAT, la Civito nun starigas oficialajn rilatojn kun aldona nerekonita ŝtato, post la Kabina Respubliko. Ĝi oficiale ofertas rekonon al la Islama Ŝtato de Irako kaj Sirio, kontraŭ reciproka rekono de la Esperanta Civito.

Observantoj rimarkas la simlarecojn inter la du organizoj. Ambaŭ ne estas rekonitaj, ambaŭ efektive estas teokratioj, kaj ambaŭ foje uzas violenton sed estas milite malfortaj. Konsulo aŭ kalifo, al ambaŭ oni ne volas perdi siajn gefilojn.

## ANONCO

Volontuloj bezonataj por scienca eksperimento pri ligo inter festado kaj laceco. Interesitoj sin anoncu ĉe d-ro H.R. Ŝanĝo je dimanĉo 02:00.

# NEJ-Novaĵoj!

## La unua duobla NEJ-tago

Antaŭ unu monato okazis la unuan fojon en NEJ-historio du NEJ-tagoj sinsekve. NEJ-anoj vizitis du intereseajn okazaĵojn je la 30-a de septembro kaj la 1-a de oktobro:

Drongo-festivalo: Kiel pasintjare ni vizitis la lingofestivalon Drongo en Utrecht. Ĉeestis kompreneble Esperanto-budo, sed ankaŭ budoj kaj prelegoj pri interpretado, tradukado, gestolingvoj, dialektoj kaj multe pli. Kaj vespere bongustis la memkuirita pastaĵo!

Monda statua konkurso: Ni alvenis trajne por spekti vivantajn statuojn. Artistoj en nekredeblaj kostumoj bildigis apenaŭ imageblajn aferojn tra la tuta urbacentro.

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Vi renkontos interesan fremdulon, kiu redonos vian monujon.

**Taŭro:** Vi laciĝos. Tio eble kaŭzos festadon.

**Ĝemeloj:** Oktobro estas bona monato por trajnoj, sed eĉ pli por amo.

**Kankro:** Vi malkovras, ke glutenoj pli bongustas ol guldenoj.

**Leono:** Vi ekhavos novan fobion kaj malnovan hobion.

**Virgulino:** Post Amorumu vi ne plu estos.

**Pesilo:** Vi nur kredas je serioza astrologio kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Vi havos singulton je la 5-a de novembro.

**Kévin M.:** Atentu ne tranĉi fingron legante malnovajn Pos-Amikojn.

**Sagitario:** Vi provos vendi viajn sonĝojn.

**Kaprikorno:** Li jam scias vian sekreton.

**Akvisto:** Kunportu tri haringojn, tendŝnuron, levstangon kaj rozkoloran aŭtoradon al JES.

**Fiŝoj:** Ŝminku aŭ estu ŝminkita.



*La plej interesa statuo estis NEJ-anoj mem*

## MEMBROASEMBLEO

Al la sabatmatena asembleo invitiĝas ĉiuj NEJ-anoj sed ankaŭ bonvenas aliaj.

Nederlande kaj Esperante oni preparolos la jenajn temojn:

- Statutŝanĝo
- Elekto de nova estraro
- Varbstrategio de NEJ
- Estonteco de NEJ-tagoj
- Ebleco inviti IJK-on

Kaj kompreneble eblas proponi temojn.